

Internacia Fervojisto

Dumonata organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF)
revuo pri fervojo



ISSN 1397-4270

2024.2

La reloĵ ligas la landojn – Esperanto la popolojn



Estimataj gelegantoj

IFEF antaŭ 50 jaroj.

Kio aperis en IF N-ro 2/1974? Iam estas interese reveni al pasinteco. Do, ĝuu la duonjarcentan atmosferon en fervojista E-movado.

- En preparo estis la 26-a IFEF-kongreso en *Tarragona*, Hispanio. Je la 5-a de Marto aliĝis 581 partoprenantoj el 18 landoj.
- En programo de la kongreso estis vizito de monaĥejoj Santa Maria de Poblet kaj Santes Creus.
- Aperis ekstrakto de artikolo de prof. D-ro Ivo Lapenna „Memdisciplino kiel komplemento de demokrateco“.
- Riĉenhava jarraporto de la sekretariino Elfriede Kruse por la jaro 1973 – ekz.:
 - Membrostato 2919, kresko kontraŭ 1972 – 67 membroj.
 - En la jaro 1973 estis honorigita Ingvard Kensing (DK) – honora membro IFEF.
 - Al sekretariejo venis 420 korespondaĵoj kaj estis forsendataj 475.
 - Estraranoj realigis 10 eksterlandajn vizitojn (jarkunvenojn).
 - Junulara sekcio ne funkcias.
 - Alte estas taksata la 25-a IFK 1973 en Århus.
 - Okazis 15-a IFES en Jugoslavio (partoprenis G. Brandenburg).
 - Per Engen fariĝis direktoro de Norvegaj Ŝtataj Fervojoj.
 - Listo de fervojaj fakdelegitoj de UEA.

Bona rememoro, ĉu ne?



IFEF-estraro bondeziras ĉiujn niajn koleginojn okaze de la 8-a de Marto, Internacia Tago de Virinoj.

Via redaktoro

Enhavo:

Raporto de IFEF-ĉefkomitatano por la jaro 2023.....	24
Raporto de IF-redaktoro 2023	26
Novaĵoj pri la EEK kaj 75-a IFK	26
Raporto de la kasisto pri la jaro 2023	28
Tagordo de la IFEF-plenkunsido (Komitatkunsido)	29
Tagordo por la kunveno de FK dum la 75-a IFK en Strasburgo	30
Marija Vukušić (23.8.1927-05.02.2024).....	30
Etŝpuraj fervojoj en belgaj Ardenoj – 2-a parto, daŭrigo de IF 2024.1	31
Post jarmiloj	33
La dua plej amase uzata pariza metroo-linio funkcias plene aŭtomate	36
Renovigo de Fanta-konstruaĵo.....	37
Rapido 200 km/h en Serbio	38
Fakaj prelegetoj dum la 75-a IFK en Strasburgo	39
Eŭropaj altrapidaj trajnoj – ĉefprelego dum la 75-a IFK Strasburgo.....	39
Titolpaĝo: Nova fasado de la ĉefa Praga stacidomo (fonto: vidu artikolon sur paĝo 37)	

Internacia Fervojisto

Dumonata fervojfaka revuo en Esperanto kaj organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)

Apero: Januaro, Marto, Majo, Julio, Septembro, Novembro

Redaktofino: La 10-a de la antaŭa monato

Estraro de IFEF

Prezidantino: Rodica Todor (Rumanio) prezidantino@ifef.net

Sekretario: Vito Tornillo (Italio) sekretario@ifef.net

Kasisto: Laurent Vignaud (Francio) kasisto@ifef.net

Redaktoro: Ladislav Kovář (Ĉeĥa Respubliko) redaktoro@ifef.net

Gvidanto de la Faka Komisiono: momente neokupita

Membroj de la Redaktora Komisiono

Lene Niemann (Danio), Guido Brandenburg (Germanio), István Gulyás (Hungario), Zlatko Hinšt (Kroatio), Laurent Vignaud (Francio)

Membroj de la Faka Komisiono

Guido Brandenburg (Germanio), ts@ifef.net

Jaroslav Matuška (Ĉeĥa Respubliko), fas@ifef.net

Bank-Konto:

Nomo: „Laurent Vignaud”

IBAN: FR33 20041 0 1011 0929 374Y 03237

BIC: PSSTFRPPNTE

UEA-konto: iffk-o

Retejo: www.ifef.net

Facebook: <https://www.facebook.com/pages/IFEF-Internacia-Fervojista-Esperanto-Federacio/726039834155372>

RAPORTO DE IFEF-ĈEFKOMITATANO POR LA JARO 2023

INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO (IFEF)

Dum la jaro 2023 mi kiel ĉefkomitatano plenumis multajn taskojn. La 4-an de Januaro 2023 mi ricevis leteron de nia prezidantino pri la stato de landa asocio en Hungario (HFEA). Mi esprimis mian opinion pri tio, kaj same pri datumoj kaj statistika aliro en kadro de la raportoj de ĉefkomitatano kaj landaj asocioj. La 16-an de Januaro prezidantino raportis pri nova nomo – Hungara Fervojista Esperanto-Rondo - kun demandoj al la nova organizo pri ĝia estonta agado. La 14-an de Januaro mi sendis proponojn pri cirkulero n-ro 1/2023 kaj jarraportan demandilon 2022 al la IFEF-estraranoj kaj al la anstataŭanto de la ĉefkomitatano. Mi korektis la jarraportan demandilon laŭ ricevitaĵ retpoŝtaj rimarkoj konsiderante la ŝanĝo-postulojn. Poste mi okupiĝis pri membro-statistiko, kies koncepto kaj klarigoj estis konsiderataj dum la jaro 2022, ankaŭ en cirkuleroj de la ĉefkomitatano kaj raportoj pri ĝia apliko. Mi defendis la proponitan manieron prezenti la koncernajn datumojn. La 23-an kaj la 24-an de Januaro 2023 mi sendis al la estraranoj kaj al kolegoj Hakl kaj Matuška adaptitan version de la jarraporta demandilo 2022 kaj de ĉefkomitatana cirkulero. La 26-an de Januaro 2023 post meznokto mi sendis lastfoje proponojn de la menciitaj cirkulero 1/2023 kaj jarraporta demandilo 2022 al la estraranoj kaj al la anstataŭanto de la ĉefkomitatano. La raporton de IFEF-ĉefkomitatano por la jaro 2022 kun dato de la 1-a de Februaro 2023 mi sendis al la redaktoro kiu poste aperigis ĝin en IF 2023.3. La 22-an de Februaro mi sendis plenigitan jarraportan demandilon 2022 pri KFEA (Kroata Fervojista Esperanto-Asocio) kiel komitatano de KFEA al la estraranoj kaj al la anstataŭanto de la ĉefkomitatano. Tiu estis ekzemplo por montri koncepton kaj aplikon de membrara statistiko.

La 26-an de Januaro 2023 vespere okazis unua sendo al reprezentantoj de IFEF-membroj en 12 landaj asocioj (LA-j), kiel prezidantoj, komitatanoj, anstataŭantoj de komitatanoj kaj aliaj, akompana elektronika letero pri la finaj versioj de cirkulero de la ĉefkomitatano n-ro 1/2023 kaj la jarraporta demandilo 2022. Limdato por plenigi la jarraportan demandilon 2022 estis la 28-an de Februaro 2023. Ricevinte

plenigitajn jarraportajn demandilojn mi sendis kritikajn rimarkojn al kelkaj landaj asocioj. Dua dissendo de cirkulero kun memoriga mesaĝo okazis la 1-an de Marto 2023 celante la LA-jn kiuj ne liveris siajn raportojn. Ĝis tiam siajn jarraportojn sendis nur 5 LA-j. Sekvis plurfojaj admonoj rilate al la jarraportoj 2022: la 10-an de Marto trian fojon, la 20-an de Marto kvaran fojon, la 30-an de Marto kvinan fojon kaj la 11-an de Aprilo sesan fojon. La lasta jarraporto alvenis de HAFE (Hispana Amikaro de Fervojistoj Esperantistaj) la 6-an de Aprilo 2023. La ĉefkomitatano raportis ke li sukcesis inter 14 LA-j ricevi entute 12 jarraportojn: de Aŭstrio, Belgio, Bulgario, Ĉeĥio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Kroatio, Pollando kaj Rumanio, sen Ĉinio kaj Slovenio. La 18-an de Majo 2022 la prezidanto de slovena landa asocio (Fervojista Esperanto-Societo Maribor) sendis mallongan jarraporton pri la jaro 2021, pli ne. Ekde Majo 2023 la Fervojista Esperanto-Societo Maribor fariĝis parto de la Esperanto-Societo Maribor. Mi estis en konstantaj kontaktoj kun sekretario Vito Tornillo kaj kasisto Laurent Vignaud pro eventualaj plusendoj de ricevitaj jarraportoj, pro iliaj klarigoj kaj informoj. La sekretario la 24-an de Aprilo 2023 surbaze de ricevitaj LA-jarraportoj sukcesis fini sian resuman jarraporton de la landaj asocioj de IFEF pri la jaro 2022 kaj sendi ĝin al estraranoj kaj aliaj funkciuloj.

Mi kompilis aktualan IFEF-adresaron 2023 kaj sendis ĝin al IFEF-estraranoj la 20-an de Aprilo 2023. Post rimarkoj kaj diskutoj mi faris novan version de la teksto kiun mi sendis la 30-an de Aprilo al komitatanoj kaj reprezentantoj de LA-j, individuaj membroj, amikoj de fervojo kaj al kunlaborantaj organizoj de IFEF (asocioj, muzeoj, bibliotekoj). Mi verkis finan version de la teksto kaj sendis ĝin la 3-an de Junio al komitatanoj kaj reprezentantoj de LA-j, individuaj membroj, amikoj de fervojo kaj al kunlaborantaj organizoj. Tiel finiĝis la laboro en la jaro 2023.

Mi skribis raporton de la ĉefkomitatano pri membraro de landaj asocioj kaj de IFEF en la jaro 2022 kaj sendis ĝin al la estraranoj kaj la anstataŭanto de la ĉefkomitatano la 25-an de Aprilo. Ĝi ne estis sendata al reprezentantoj de LA-j, individuaj membroj kaj aliaj.


Aldone mi antaŭ IFEF-kongreso verkis raporton de la ĉefkomitatano

pri agadinformoj, pri komitatanoj, partoprenantoj ktp. kaj sendis ĝin la 22-an de Aprilo 2023 al estraranoj kaj la anstataŭanto de la ĉefkomitatano. La 30-an de Aprilo 2023 mi sendis ĉi-tiun raporton al reprezentantoj, precipe al komitatanoj, de landaj asocioj kaj al individuaj membroj de IFEF. Finan version de raporto mi sendis post IFEF-kongreso al reprezentantoj de LA-j kaj al individuaj membroj la 2-an kaj la 3-an de Junio 2023.

Zagreb, la 9-an de Januaro 2024

Zlatko Hinšt, IFEF-ĉefkomitatano

Raporto de IF-redaktoro 2023



En la pasinta jaro 2023 estis publikigita la revuo Internacia Fervojisto 6-foje kun entuta nombro de paĝoj – 120. Temoj de la publikigitaj artikoloj estas kompare kun antaŭaj statistikoj preskaŭ la samaj – nove aperis du artikoloj pri agado de FISAIC. La plej nombraj estis kontribuadoj pri agado de la Federacio (raportoj, kongres-informoj kaj Verden-informoj). Post tiuj sekvas artikoloj pri teknikaj interesaĵoj. Iomete kreskis nombro de artikoloj pri agado de LA – sed tamen ĝi nesufiĉas por fari imagon pri situacio en niaj membro-asocioj.

Ĝojiga estas informo, ke kreskis nombro de kontribuantoj – entute 23. Inter ili la plej „laboremaj“ estas Jan kun Lene Niemann, Vito Tornillo kaj Jaroslav Matuška.

Kiel tradicie sur tiu ĉi loko, mi esprimas sinceran dankon por tre valora kunlaboro al membroj de la redaktora komisiono kaj kontribuantoj.

Ladislav Kovář, redaktoro de IF

Novajoj pri la EEK kaj 75-a IFK



LKK de la Eŭropa Esperanto-Kongreso publikigis novajn informojn pri la kongreso, kiuj koncernas ankaŭ nin IFEF-anojn. Nun estas jam ebleco elekti kaj aliĝi al ekskursoj, mendi poŝtmarkojn, kursojn kaj postkongreson – vidu ligilon:

<https://www.esperanto.de/eo/node/3146>

pliaj informoj:

<https://kongreso2024.esperanto-france.org/>

Ne hezitu kaj agu rapide, la nombro de partoprenantoj estas limigita.

Provizora programo de la 75-a IFEF-kongreso, Strasburgo Francio			
8.5.2024 merkredo	Alveno		
	16,00 – 18,00	Estrarkunsido Faka komisiono	S 3208
	18,00 – 22,00	Interkona vespero	Patio
9.5.2024 ĵaŭdo	11,00 – 12,30	Solena inaŭguro	amfiteatro
	14,00 – 15,15	Laborkunsido de FK	S 3R-03
	15,45 – 18,00	IFEF-plenkunsido	S 3R-03
	20,00 – 22,00	Vespera programo	Salle du Manège
10.5.2024 vendredo	Ekskursoj		
	20,00 – 22,00	Vespera programo	Salle du Manège
11.5.2024 sabato	14,00 – 18,00	Ĉefa prelego, prelegetoj	S 3209
	20,00 – 22,00	Vespera programo	Salle du Manège
12.5.2024 dimanĉo	9,00 – 10,00	Movadaj aferoj	S 3R-05
	10,15 - 11,15	Prezento de la venonta IFK	S 3R-05
	11,30 - 12,30	Solena fermo (EEK)	amfiteatro
	forveturo		

Raporto de la kasisto pri la jaro 2023 (sumoj en eŭroj)

Enspezoj	2023	2022	Elspetoj	2023	2022
Kotizoj 2023	2286,00	2514,00	IF-presado	525,12	568,27
FFK-vendo			IF-sendo	222,60	310,20
Donaco	2030,00	5001,00	UEA - kotizo	132,00	132,00
IFK 2021 profito		684,57	Estraro	50,00	324,10
IFK 2023 profito	114,56(*)		Reprezentado	14,00	1204,94
			FISAIC	150,00	150,00
			Fak-eldonaĵoj	171,58	158,42
			Bankkosto	16,81	16,20
			Zoom-abono	62,28	170,68
			ifef.net	22,79	22,44
Sumo:	4430,56	8199,57	Sumo:	1367,18	3057,25

(*) 114,56 EUR = reala profito de 768,56 EUR por IFEF minus financa subteno 654 EUR IFEF-flanke al la kongreso.

Kotizoj: En ĉiuj landaj asocioj la membronombro stabilas aŭ iomete malkreskis. Nur en Belgio la membronombro kreskis (de 15 al 23).

Bilanco je la 31-a Decembro 2023					
Aktivoj	2023	2022	Pasivoj	2023	2022
Banko	717,78	5416,96	Fondusoj diversaj	4163,86	4205,86
UEA-konto	20760,68	4880,12	„Historia libro (IFEF 100 jaroj)”	1459,29	1459,29
Kaso	3136,56	2268,56	Jarrezultoj sumigitaj	15703,49	10561,17
Ricevotaj kotizoj	114,00		Ĉijara rezulto	3063,38	5142,32
Belgio IFK 2023		9148,00	Antaŭricevitaj kotizoj	339,00	345,00
Sumo:	24729,02	21713,64	Sumo:	24729,02	21713,64

Ĉi-jara rezulto: Ankaŭ en 2023 ĝi estas granda pro tio, ke malfondiĝante la landa asocio en Slovenio donacis 2000 eŭrojn al IFEF.

Belgio IFK 2023: Temas pri alpruntoj subtene al organizado de la IFEF-kongreso kaj postkongreso en Belgio en Majo 2023. En la jaro 2023 IFEF ricevis la tutan sumon.

Propono de buĝeto por la jaro 2025			
Enspezoj	EUR	Elspezoj	EUR
Kotizoj	2300,00	IF-presado	500,00
FFK-vendo	25,00	IF-sendo	250,00
		UEA-kotizo	132,00
		Estontaj agadoj/Reprezentado	760,00
		FISAIC	150,00
		Estraro	250,00
		Zoom-abono	70,00
		Bankkosto	20,00
		Fak-eldonaĵoj	170,00
		ifef.net	23,00
Sumo:	2325,00	Sumo:	2325,00

Laurent Vignaud, IFEF-kasisto

TAGORDO DE LA IFEF-PLENKUNSIDO (Komitatkunsido)

en la 75-a IFEF-kongreso en Strasburgo (FR) (08-12.05.2024)

1. Malfermo, konstato de la mandatoj
2. Ricevitaj telegramoj, leteroj
3. Honorigo al la mortintoj
4. Estraranaj raportoj
 - 4.1. Sekretario kun resumo de la jarraportoj 2023 el la landaj asocioj
 - 4.2. Redaktoro
 - 4.3. Kasisto
5. Diskuto kasraporto-bilanco 2023/buĝeto 2025, kotizkonfirmo
6. Protokoloj IFK Antverpeno
7. Raporto de la ĉefkomitatano
8. Raportoj de la Faka Komisiono (FK)
 - 8.1 Gvidanto
 - 8.2 Sekretario Fake Aplika Sekcio (FAS), Terminara Sekcio (TS)
9. Raportoj de la komisiitoj
 - 9.1 Komitatano „A” de IFEF ĉe UEA.
 - 9.2. Rilatoj al aliaj organizoj: FISAIC; SAT; ILEI; UMEA; ISAE; TAKE ; IKEF
 - 9.3. Fakdelegitoj de UEA

10a. Elektoj:

10.1 Konfirmo de komitato pri elekto de gvidanto ene de FK

10.2 Konfirmo de komitato pri elekto de sekretarioj ene de FK

10b. Kongresproponoj

10.3 Elekto de la ĉefkomitatano kaj anstataŭanto de Ĉk

11. Analizo pri la situacio kaj la estonto de IFEF (dum la IFEF Movada Forumo)

11.1 Raportoj de la laborgrupoj

11.2 Strategia laborplano

11.3 Situacio en kelkaj landoj

12. Venontaj kongresoj

12.1 Konfirmo de la invito al la 76-a IFK en 2025 en Slovakio (Trenčín)

12.2 Elekto de la lando por la 77-a IFK en 2026 (Serbio)

12.3 Diskuto/propono pri pluaj ebloj: 2027, 2028?

13. Eventualaĵoj

14. Libera diskutado

Vito Tornillo, IFEF-sekretario

Tagordo por la kunveno de FK dum la 75-a IFK en Strasburgo

1. Bonvenigo.
2. Fakaj programeroj dum la 75-a IFK.
3. Elektoj de Sk de TS kaj FAS por venonta laborperiodo.
4. Raporto pri laboro de la Fake Aplika Sekcio.
5. Raportoj pri faka laboro en unuopaj IFEF landaj asocioj.
6. Raporto pri laboro de la Terminara Sekcio.
7. Trakto de nocioj laŭ informoj en la Terminara(j) Kuriero(j).
8. Fakaj programeroj dum la 109-a UK en Aruŝo.
9. Ceteraĵoj/eventualaĵoj (korektado de la adreslisto).



Jaroslav Matuška

Marija Vukušić (23.08.1927-05.02.2024)

La 5-an de Februaro 2024 mortis Marija Vukušić, membrino de Kroata Fervojista Esperanto-Asocio (KFEA) ekde la jaro 1976 naskiĝinta en la 23-a de Aŭgusto 1927, do 96 jaraĝa. Ŝi estis kasistino de iama FES -

Fervojista Esperanto-Societo Zagreb (1977-1987), poste membrino de Kontrolkomitato de KFEA. Laŭprofesie Marija estis supera transporta oficisto en iama fervoja entrepreno. Ŝi esperantistiĝis unue en la jaro 1975 kaj poste dum Esperanto-kurso en adriatika apudmara E-kampadejo en *Primošten* en la jaro 1977. Marija vizitis plurajn IFEF-kongresojn kaj aliajn E-manifestaciojn. Funebra ceremonio okazis la 12.02.2024 en kremaciejo de zagreba tombejo *Mirogoj*.

Ni sincere esprimas kondolencon. Marija restas en niaj memoroj. Ŝi ripozu en paco.

Zlatko Hinšt

Etŝpuraj fervojoj en belgaj Ardenoj – 2-a parto, daŭrigo de IF 2024.1

Ekzemploj:

- Laŭtakse 30 % de tramliniolaro post la jaro 1918 bezonis entutan rekonstruon ĉar la germana armeo malmuntis liniojn por konstrui densan reton ĉe la fronto.
- En la jaro 1940 ekzistis nepreta tramvojo en Ardenoj kiun oni neniam finkonstruis pro la milito (pro necerteco kaj manko de ligno kaj reloj).

Krome pro kresko de la aŭtotrafiko oni emis plilarĝigi ŝoseojn kaj konsideri tramvojojn kiel spacovora antikvaĵo. Reloj ofte troviĝis eksterurbe je stratflanko kaj enurbe je stratomezo. Tramo do eksterurbe en unu direkto “fantomveturis” je maldekstra strat-flanko. Kompleta rekonstruo de tiuj retpartoj signifus multekostan investon. Estis pli facile anstataŭigi tramon per buso. Ju pli da aŭtomobiloj aperis, des pli ekvalidis la argumento pri survoja malsekureco pro tramo.

Kombino de ĉiaj mapoj min tre surprizis. Eblas konkludi, ke entute en 5 stacioj ĉe la plej suda belga Ardena trajnlinio (165/166) iam ekzistis ebleco ŝanĝi inter metroŝpuro kaj normalŝpuro. Tiuj stacioj funkciis kiel la nuntempaj “multrimedaj trafiknodoj”. Kiam trajno de iu sistemo malfruis, la ŝoforo de alisistema trajno atendis ĝin por kiel eble plej bone servi la klientojn.

Inter la francaj urboj *Givet* kaj *Longwy* (distanco pli ol 100 km) nuntempe neniu relvojo transiras landlimon inter Belgio kaj Francio. Mi elektis tiujn urbojn kiel limpunktoj ĉar:

- La iama relkonekto en la Mozo-valo grandparte daŭre ekzistas, ĉar nur la parton inter *Givet* (Franio) kaj *Dinant* (Belgio) oni ne plu uzas. Tiu linio klare kongruas kun grava pejzaĝa limo.

- La plej proksima kaj pli okcidenta funkcia translima relvojo ja troviĝas inter *Jeumont* (Franco) kaj *Erquennes* (Belgio); temas pri tute alia regiono.

Entute inter *Givet* kaj *Longwy* malaperis 5 relaj limtransiroj: 2 normalŝpuraj linioj kaj 3 metroŝpuraj linioj.

El sudoriento al nordokcidento temas pri:

- *Lamorteau*: belga trajnlinio 151 estis grava por var-transporto al Francio ĝis ĉesigo en la jaro 1985.

- Trajnlino 523 el vilaĝeto *Saint Vincent Belfontaine* (belga trajnlinio) al belga ĉelima vilaĝeto *Villers-devant-Orval*. Tiu linio ne transiras la landlimon.

- Trajnlino 558 de vilaĝo *Florenville* al *Marbehan* (ĉe trajnlinio 162) kaj al *Sainte Cecile* (ĉe linio 163A). Tiu linio ne transiras la landlimon.

- Trajnlino 163A: tre multekosta linio inter *Bertrix* (Belgio) kaj *Carignan* (Francio) kiu post 14-jara laborado estis preta en la jaro 1914. Tial ĝi fakte ĉefe utilis al germana armeo dum mondmilito por ligi Germanion (*Gerolstein*) al Francio (*Carignan*). En la jaro 1940 la samo okazis ĝis detruo de kelkaj viaduktoj en la jaro 1944. Nove eblis uzi la linion ekde la jaro 1949 kaj la trafiko denove ĉesis inter la jaroj 1959 (pasaĝeroj) kaj 1961 (varoj). Inter ĉiuj belgaj fervojlinioj, la linio 163A pruveble akiris la plej malbonan finan rendimenton.

- Trajnlino 34 inter *Paliseul* kaj *Bouillon* kaj plue al du francaj branĉoj ĝis Mozo-valo.

- Trajnlino 553 de *Gedinne* al *Vresse* kaj *Alle*. Ĝi estis preta en Julio 1914. Germanoj malmuntis parte la linion kaj ĝi denove malfermiĝis en la jaro 1921. La plilongigo al ĉelima urbeto



Tramo Paliseul - Bouillon

Bohan bezonis konstruon de du pontoj kaj unu tunelo kaj pro tio nur ekutilis en Majo 1935. En Oktobro 1938 ekveturis tramoj translime al franca urbeto *Sorendal* kaj plue al fervojlinio en urbo *Monthermé* en Mozo-valo. Malfeliĉe en la jaro 1940 franca armeo detruis la belgan ponton provante haltigi la germanan armeon. Per lignaj fostoj oni riparis la ŝtonan ponton kaj veturis tramoj ... ĝis en la jaro 1944 germanoj detruis la ponton por bremsi la aliancanojn. En la jaro 1947 oni tie forprenis la relojn. La pasaĝertrafiko je la restanta linioparto ĝis la stacidomo de *Gedinne* finiĝis en la jaro 1950. La ponton Belgio riparigis en 2022 por krei biciklovojon.

Paul De Cooman

Post jarmiloj ...

H.C.Andersen (1805-1875), la dana verkisto, kiu estas tre fama pro fabeloj (por infanoj kaj plenkreskuloj), tre interesiĝis sin pri vojaĝoj. Li mem multe vojaĝis kaj uzis la plej novan teknikan transportrimedon, la trajnon. Li tre admiris la grandajn teknikajn progresojn, kiuj okazis ĝuste en lia vivotempo.

En 1853 li verkis tiun rakonton/fabelon pri usonaj turistoj, kiuj vizitas Eŭropon „post jarmiloj”. Eble por li estis kvazaŭ fantazio, sed verdire li preskaŭ „profetis” pri fulmrapida teknika evoluo kaj pri vojaĝoj, kiujn turistoj nun faras ĉiutage. Andersen skribis „post jarmiloj”, sed iom pli ol unu jarcento sufiĉis!

Estas tre amuze legi, kion pensis H. C. Andersen tiam, kaj kion ni spertas nun, nur 170 jarojn pli poste. Kvankam fakte ne temas pri fervojo, mi rekomendas al vi legi. La vojaĝo okazas per aviadilo (aerŝipo li nomas ĝin), sed li mencias, ke oni iras per la submara tunelo de Anglio al Francio – sen mencii kiel, sed verŝajne li pensis pri fervojo!

Ankaŭ oni povas pensi pri „niaj” grandaj monumentoj kaj aliaj vidindaĵoj, kiuj parte (laŭ la fantazio de Andersen) ne plu ekzistas „post jarmiloj”.

Jes, post jarmiloj ili venos tra la aero trans la grandan maron.

La junaj enloĝantoj de Ameriko vizitos la malnovan Eŭropon. Ili venos vidi la monumentojn kaj iros al malnovaj urboj, same kiel ni nuntempe iras al la pereintaj temploj de Suda Azio.

Post jarmiloj ili venos!

Themsen, Donau, Rhinen ankoraŭ fluas: *Montblanc* staras kun neĝa pinto, nordlumoj brilas en landoj de la Nordo, sed generacio post generacio fariĝas polvo. Vicoj de la granduloj de la momento, kiel tiuj, kiuj nun jam dormetas sub la herbaĵo – kie la bonhava komercanto, kies grundo ĝi estas, faras benkon por sidi kaj rigardi la platan, ondantan grenkampon.

„Al Eŭropo!” diras la juna generacio de Ameriko – „al la bela lando de la gepatroj, memoroj kaj fantazio, Eŭropo!”

La aerŝipo venas: plenŝtopita de vojaĝantoj, ĉar la vojaĝo estas pli rapida ol surmare; la elektromagneta fadeno sub la maro jam telegrafis, kiom granda estas la aer-karavano. Jam nun videblas Eŭropo, la irlandajn marbordojn oni vidas, sed la pasaĝeroj ankoraŭ dormas. Ili vekiĝas nur, kiam ili estas super Anglio ... tie ili suriras la Eŭropan terenon, en la lando de Ŝekspiro, kiel diras filoj de la animo, aliaj volas vidi la landon de politiko, de maŝinoj.

Unu tutan tagon oni restas tie ... tiom da tempo la tre okupita generacio povas doni al Anglio kaj Skotlando.

La vojaĝo daŭras per submara tunelo al Francio, la lando de Karlo la Granda kaj de Napoleono. Molière oni mencias – la kleruloj parolas pri klasika kaj romantika skoloj en la fora pratempe, kaj oni ĝojkrias pri herooj, trobadoroj kaj sciencistoj, nekonataj de ni nuntempe, sed kiuj naskiĝis sur la kratero de Eŭropo - Parizo.

La aerŝipo flugas super la lando, de kie Kolumbo ekveturis, kie Cortez naskiĝis, kaj kie Calderon dram-kantis per ondantaj strofoj; belaj nigre-okulaj virinoj ankoraŭ vivas en la florantaj valoj, kaj en pratempaj kantoj estas menciitaj *Cid* kaj *Alhambra*.

Tra la aero, trans la maro al Italio, al la loko, kie troviĝis la „Eterna Romo”, kiu nun ne plu ekzistas: la pejzaĝo estas kvazaŭ dezerto; de la Peter-preĝejo oni montras mur-restaĵon (sed oni dubas pri la aŭtentikeco).

Al Grekio, por dormi unu nokton en la bela hotelo pinte de la Olimpo, - poste oni povas diri, ke oni estis tie. La vojaĝo daŭras al *Bosporus* por tie resti dum kelkaj horoj kaj ripozi kaj vidi la lokon, kie troviĝis *Byzanz*. Malriĉaj fiŝkaptistoj metas siajn retojn tie, kie la historio rakontas pri la

Ĝardeno de la Haremo, en la tempo de la turkoj.

Oni flugas super restaĵoj de grandiozaj urboj ĉe la bordo de *Donau*, urboj, kies nomojn ni ne nun konas, - sed kelkloke la aerŝipo malleviĝas ĉe riĉaj urboj de memoroj kaj denove leviĝas.

Tie kuŝas Germanio, kiu iam estis kovrita de tre densa reto de fervojlinioj kaj kanaloj ... la landoj, kie Luther parolis, kie Goethe kantis, kaj kie Mozart siatempe portis la Sceptron de la Tonoj! Grandaj nomoj lumis en arto kaj scienco, nomoj, kiujn ni nun ne konas. Restado de unu tago por Germanio kaj unu tago por la Nordo. Por la lando de *Ørsted*, por la patrujo de Linné kaj por Norvegio, la lando de pratempaj herooj kaj la junaj norvegoj. Islandon oni vizitas dum la hejmenveturo: *Geysir* ne plu bolas, *Hekla* estingiĝis, sed kiel eterna ŝtontabulo de la Sagaoj staras la forta roka insulo en la muĝanta maro!

„En Eŭropo estas multaj vidindaĵoj” diras la juna Amerikano, „kaj ni vidis ĉion dum ok tagoj, kaj tio eblas, kiel la Granda Vojaĝanto ...” (nomo estas menciita, kiu apartenas al ilia epoko)... montris Andersen en sia fama verko „Eŭropo dum ok tagoj”.



La domo en *Munkemøllestræde*, *Odense*, kie H.C.Andersen loĝis kiel infano. Tie kreskis infano kun granda fantazio!

Jan kaj Lene Niemann

La dua plej amase uzata pariza metroo-linio funkcias plen-aŭtomate



Francio: La dua plej amase uzata metroo-linio en Parizo estis komplete transformita al senpriserva trafiko de aŭtomatiga nivelo 4 post periodo kiam trajnoj gvidataj de kondukistoj trafikis samtempe kun aŭtomatigitaj trajnoj.

Linio n-ro 4 kun longo de 14 km veturas el *Porte de Clignancourt* en nordo al *Bagneux-Lucie-Aubrac* en sudo kaj ĝi transportas 700 000 vojaĝantojn tage. Ĝi estas unu sola metro-linio en Parizo, kiu konektas ĉiujn aliajn metro-liniojn kaj *RER*.

RATP kaj transportoficejo *Ile-de-France-Mobilités* decidis en la jaro 2013 transformi la linion n-ro 4 al *GoA4* sistemo kun celo plibonigi kvaliton kaj fidindecon de servoj. En la jaro 2015 akiris kompanio *Siemens Mobility* mendon por livero de sistemo *Trainguard CBTC*. De tiu tempo estis en 29 stacioj instalataj ekranoj sur kajorandoj kun informsystemoj por vojaĝantoj kaj en la jaro 2020 la regado de la linio estis transprenata en novan regadcentron.

Unu el la plej grandaj defioj de la projekto estis la vagonfloto de la linio, kiu konsistas el tri diversaj sesvagonaj trajnkompletoj kun larĝaj pneŭmatikoj liverataj de kompanio *Alstom*. Je dispono estas nun 21 trajnkompletoj *MP89CA* kaj 11 trajnkompletoj *MP05* plus 20 novaj trajnoj *MP14CS*. *CBTC* devas adapti siajn ordonojn tiel, ke ili konvenu al certa tipo de relveturilo.

Dinamika testado de aŭtomata trafiko komenciĝis en la jaro 2022 kaj en Septembro de la sama jaro estis en aŭtomata trafiko enkondukataj kvar vagonkompletoj *GoA4* indikitaj de kompanio *RATP* kiel „naveda

trafiko“. Semajnfinaĵ kaj vesperaj konektoj estis en Majo 2023 plene aŭtomataj, mane regada veturo finiĝis en Decembro 2023.

Nova trajnsekuriga sistemo ebligas minimuman intervalon de 85 sekundoj. En ordinara trafiko veturas trajnoj en pinthoroj ĉiun 105-an sekundon.

Plia aŭtomatigado estas planita.

Linio 13 estos plia linio, kiu estos sangkonstruata al plene aŭtomata trafiko. Ĝi prezentos novan defion ĉar ĝi havas branĉojn kaj estas tie uzataj trajnoj kun ŝtalaradoj.

Ladislav Kovář, Metro Report International 25 Januaro 2024

Renovigo de Fanta-konstruaĵo



En Decembro 2023 finiĝis la unua etapo de ambicia renovigo de Fanta-konstruaĵo en la ĉefa fervojstacidomo Prago. Ĝi estas unu el la plej famaj seces-stilaj konstruaĵoj sur teritorio de Ĉeĥa respubliko. La konstruaĵon planis arkitekto Josef Fanta kaj estis konstruata en jaroj 1901 ĝis 1909.

En la jaro 2023 kulminis unua etapo de renovigo dum kiu estis restarigata la fasado de la konstruaĵo kaj ĝiaj historiaj internaĵoj. Sub atentema inspekto de fakuloj el la Nacia memoraĵ-instituto kaj urba magistrato estis renovigataj secesaj pentraĵoj kaj reliefaj elementoj, originalaj vitraĵoj, ceramikaj mozaikoj, lignaj fenestro- kaj pordo-kadrumoj, lignaj garnaĵoj kaj plankoj.

Ladislav Kovář, fotoj kaj teksto: www.fantovabudova.cz

Rapido 200 km/h en Serbio

Fervojlinioj en mezeŭropaj eksaj socialismaj landoj, ekz. en Ĉeĥio, Slovakio, Pollando, Hungario estas modernigitaj jam longan tempon, sed efikoj por vojaĝantoj (bedaŭrinde) ne estas ĉiam bone videblaj. La plej videblaj estas nov-aspektaj fervojstacidomoj kun nova, kolora fasado, novaj fenestroj kaj moderna internaĵo. Sed trajnoj en menciitaj landoj veturas maksimume 160 km/h, en kelkaj liniosekcioj 200 km/h (en Pollando, Ĉeĥio).



Dum mia aŭtuna vizito de Beogrado, Serbio, mi persone certigis, ke ankaŭ Serbio modernigas sian fervojreton, precipe por altrapida trafiko. Ekde printempo 2022 oni veturas inter Beogrado (*Centar*) kaj *Novi Sad* kun rapido ĝis 200 km/h. Por trafiko aĉetis Serbaj fervojoj du-etaĝajn trajnkompletojn *Stadler KISS* (kvarvagonajn, basplankajn kun 316 komfortaj sidlokoj, lokoj por bicikloj, infanĉaretoj kaj rulseĝuloj). Trajno nomita *Soko* (falko) atingas *Novi Sad* (kun unu halto en stacio *Novi Beograd*) en 36 minutoj kun averaĝa vetur-rapido de preskaŭ 125 km/h. Bileto inkl. sidloka bileto en la 2-a klaso kostas por *Soko* 573 RSD iomete malpli ol 5 eŭroj kontraŭ 430 RSD por kutima rapidtrajno kun 7 haltoj kaj veturtempo 49 minutoj.

La konstru-laboroj daŭras en preskaŭ 108 km longa sekcio *Novi Sad* –

Subotica (ŝtatlimo kun Hungario). Lanĉo de trafiko kun rapido 200 km/h estas atendata fine de jaro 2024 aŭ dum la jaro 2025. Ankaŭ en Hungario oni modernigas 152 km de fervojlinioj inter Budapeŝto kaj *Kelebia* (ŝtatlimo) por ebligi rapidon de 160 km/h. Post la plena modernigo de ambaŭ sekcioj (2025) oni planas veturtempon inter Beogrado kaj Budapeŝto de ne multe pli ol 2 horoj kaj 40 minutoj anstataŭ ĉ. 8 horoj en pasinteco. Tio estos tre grava paŝo por kvalita, rapida fervojkunligo de Balkano kaj meza Eŭropo.

Datenoj pri la fervojlinio Beogrado – *Novi Sad*

Konstru-longeco: 74,9 km

Rapido maksimuma: 200 km/h

Nombro de trakoj: 2

Tensio: 25 kV 50 Hz

Tunelo: *Čortanovci* – du-tuba kun longo de individuaj tuboj 1086 m kaj 1156 m

Konstruistoj: *CCCC + CRI (China Communications Construction Company + China Railway International: sekcio Beogrado – Stara Pazova); RZD International: sekcio Stara Pazova – Novi Sad*

Periodo de modernigo: IX/2017 – III/2022.

Jaroslav Matuška

Fakaj prelegetoj dum la 75-a IFK en Strasburgo

Ankaŭ dum la 75-a IFK en Strasburgo okazos fakaj preletoj. La francaj kolegoj preparas ĉefan prelegon. Krom tio estos sufiĉe da tempo por aliaj, mallongaj preletoj. Mi ŝatus kuraĝigi ĉiujn partoprenantojn, kiuj povus prezenti transport-fakan prelegon - sendu al sekretario de Fake Aplika Sekcio de IFEF (fas@ifef.net) titolon kaj kelk-frazan resumon de via preleto. Limdato estas fino de Marto 2024. Ĉiuj originalaj (ĝis nun aliloke ne prezentitaj) preletoj estos publikigitaj en la venonta kolekto de la Fervojfakaj Kajeroj.

Jaroslav Matuška, sekretario de FAS

Eŭropaj altrapidaj trajnoj – ĉefprelego dum la 75-a IFK Strasburgo (resumo)

Eŭropaj trajnoj en Francio estas ĉefe TGV (Trajnoj de Alta Rapido) kiuj

veturas trans la landlimojn (al Britio, Belgio, Nederlando, Germanio, Svisio, Italio kaj Hispanio).

Ek de la jaro 1955, okazis pluraj rekordoj de rapido sur francaj fervoj-linioj. La prelego pritraktos la disvolviĝon de tiuj rekordoj paralele kun la konstruo de novaj altrapidaj linioj kaj diversaj konektoj kun najbaraj landoj: Britio (kun Submanika tunelo), Belgio: Bruselo, Nederlando: Amsterdamo, Germanio: Karlsruhe - Mannheim - Frankfurto ĉe Majno - Munkeno, Svisio, Italio kaj lastatempe Hispanio. Plue ni pritraktos bontenadon de linio per speciala trajno IRIS 320 kaj bontenadon de la trajnoj mem, por kiuj unu el ĉefaj riparejoj situas tute apude de Strasburgo en *Bischheim*.



Hubert Peyrouty, Christian Dardenne

Amuza anguleto

VUL	KA	HO	PO	KA	LU	MA	JE	KO	HUN	STA	PU
PO	FO	MO	MO	TO	PO	JO	SI	KO	DO	TO	LO
VES	FO	CER	VI	BO	CER	MO	FI	ME	DE	KU	STA
PO	KO	TA	RO	TO	VO	DO	ŜO	VO	KO	LO	KO

El ĉiuj dusilabaj vertikalaj vortoj forstreku tiujn, kiuj indikas animalojn. Unuaj silaboj de la restantaj vortoj donos al vi proverbon.
Preparis **Ivan Potiška**, solvo de enigmo el n-ro IF 2023.5: STACIDOMO.